Kiam mi hodiaŭ renkontas gejunulojn, mi konsciiĝas, ke ili post 75 jaroj estas iom teditaj de ĉi temo: kaj de la milito kaj de la holokaŭsto, de la ŝoao, de la genocido. Mi komprenas ilin. Pro tio mi promesas al vi, junaj homoj, ke mi ne parolos pri mia mizero. Mi ne rakontos al vi pri miaj travivaĵoj, pri miaj du mortomarŝoj, pri tio, kiel mi travivis la finon de la milito, kiam mi pezis 32 kilogramojn, rando de la plenelĉerpiĝo kaj de la vivo. Mi ne rakontos pri tio, kio estis la plej malbona, tio estas pri la tragedio esti apartigata de miaj plejproksimuloj, kiam vi post la selektado antaŭsentas, kio ilin atendas. Ne, pri tio mi ne parolu. Mi volas paroli kun la generacio de mia filino kaj la generacio de miaj genepoj, pri ili mem.

Mi vidas, ke inter vi sidas la aŭstra federacia prezidento Alexander Van der Bellen. Ĉu vi memoras, Sinjoro Prezidento, kiam vi gastigis min kaj la prezidion de la Internacia Komitato de Aŭŝvico kaj ni parolis pri la tiamaj tempoj? Iumomente vi uzis la formulon "Aŭŝvico ne falis el la ĉielo". Oni povus diri, ke ĝi estis, kiel la poloj diras, memkomprenebla memkompreneblaĵo.

Klare, ĝi ne falis el la ĉielo. Ŝajne povus esti banala konstato, sed ĝi estas profunda kaj por la kompreno tre grava

mensa koncizaĵo. Ni dum momento reiru en nia pensoj, nia imagopovo, en la fruajn 1930-ajn jarojn al Berlin. Ni troviĝas preskaŭ en la urbocentro. La kvartalo nomiĝas Bavara Kvartalo. Tri stacioj for de la Kurfürstendamm kaj de la Zoologia Ĝardeno. Tie, kie hodiaŭ estas metroa stacio, situus parko. Kaj iun tagon en la fruaj 1930-jaroj aperis sur la benkoj ŝildo:

"Por judoj la sidado sur ĉi benkoj estas malpermesata". Oni povus diri: Tio estas malkonvena, neĵusta, ne OK (en ordo), sed finfine ja estas proksime tiom da benkoj, oni ja povis sidigi sin aliloke, ne estis malfeliĉo.

Estis kvartalo, en kiu loĝis reprezentantoj de la germana intelekta elito juddevena, ankaŭ Albert Einstein, la nobelpremiito Nelly Sachs kaj la industriulo, politikisto kaj ministro pri eksteraj rilatoj, Walter Rathenau. Poste aperis en la naĝejo la ŝildo: "Por judoj la eniro al la naĝejo estas malpermesata". Oni denove povus diri: tio ne estas agrabla, sed Berlin havas tiom da lokoj, je kiuj oni povas sin bani, tiom da lagoj, kanaloj, preskaŭ kiel en Venecio, oni do povas iri al alia loko.

Samtempe aperas ie la ŝildo "Por judoj la membreco en germanaj kantkluboj estas malpermesata". Nu, kio do? Se ili volas kanti aŭ muziki, ili do renkontiĝu apartigite kaj ili certe povos kanti.

Tuj poste aperas surskribo kaj ordono: "Por judaj nearjaj infanoj la ludado kun germanaj, arjaj infanoj estas malpermesata". Ili ludos solaj. Kaj post tio aperas ŝildo: "Al judoj oni vendas panon nur post la deksepa horo". Tio ja estas malhelpaĵo, ĉar tiam la elekteblo estas malpli granda, sed finfine oni ja povas iri por aĉeti ankaŭ post la kvina posttagmezo.

Atenton, atenton, ni komenciĝas alkutimiĝi je la penso, ke oni povas ekskludi iun, stigmatizi iun, fremdigi iun. Kaj tiel la homoj lante, pli kaj pli, tagon post tago, intimiĝas pri tio – kaj la viktimoj kaj la faruloj kaj atestuloj, kaj tiuj, kiujn ni nomas apudstarantoj alkutimiĝas je la penso kaj ideo, ke ĉi minoritato, el kiu devenis Einstein, Nelly Sachs, Heinrich Heine kaj la Mendelssohnoj estas io alia, ke ĝi povas esti elpelata el la socio, ke ĝi konsistas el fremdaj homoj, ke tiuj estas homoj, kiuj disvastigas mikrobojn, epidemiojn. Tio vere estas terura, danĝera. Tio estas la komenciĝo de tio, kio povas tuj sekvi.

La tiamaj potenculoj unuflanke faris ruzan politikon, ĉar ili ekz. plenumis la postulojn de la laboristoj. La 1-a de majo neniam antaŭe estis festita en Germanio, sed ili ja faras tion, jes. Je la senlabora tago ili enkondukas "Forto per ĝojo". Elemento de laborista feriado, do. Ili kapablas superi la senlaborecon, ili povas ludi per la nacia digno: "Germanoj, stariĝu el la malgloro de Versailles. Regajnu vian fieron". Kaj samtempe la potenculoj ekkonas, ke la homoj pli kaj pli estas kaptataj de sensentemo, de indiferenteco. Ili ĉesas reagi al la malbono. Kaj jen la potenculoj povas permesi al si pluakceli la proceson de la malbono.

Poste la alio rapidege sekvas: la malpermeso dungi judojn, la malpermeso vojaĝi eksterlanden. Kaj post tio rapide sekvas la deportado en getojn. Al Riga, Kaunas, en mian geton, la geton de Lodz-Litzmannstadt. De kie la plej multaj estas

transportataj al Kulmhof am Ner, kie ili estas mortigitaj en kamionoj per forgasoj, kaj la resto venas al Aŭŝvico, kie ili estas murditaj en modernaj gaskameroj per ciklono B. Kaj jen pruviĝas vera, kion diris la aŭstra federacia prezidento: "Aŭŝvico ne falis el la ĉielo". Aŭŝvico trotetis, faris etajn paŝojn, alproksimiĝis ĝis kiam okazis, kio okazis, ĉi tie.

Mia filino, mia nepino kaj vi, la samaĝuloj de mia filino kaj de mia nepino – eble vi ne konas la nomon de Primo Levi. Primo Levi estis unu de la plej famaj arestitoj de ĉi koncentrejo. Primo Levi iam uzis la jenan formulon: "Ĝi okazis, kaj sekve ĝi denove povas okazi." Tio signifas, ke ĝi povas okazi ĉie en la mondo.

Mi nur volas dividi kun vi unu el miaj personaj spertoj: 1965 mi estis stipendie en Usono, en Ameriko, kaj tiam estis la kulmino de la lukto por homaj rajtoj, civitanaj rajtoj, por rajtoj de la afroamerika loĝantaro. Estis honoro por mi partopreni en la Selma-Montgomery-marŝo kun Martin Luther King. Kaj tiam la homoj, kiam ili eksciis, ke mi estis en Aŭŝvico, demandis min: "Kion vi pensas, ĉu tiaĝo estis ebla nur en Germanio? Aŭ ĉu ĝi povas okazi ankaŭ aliloke?" Kaj mi diris al ili: "Tio povas okazi ankaŭ ĉe vi. Se estas lezataj civitanaj rajtoj, se ne estas respektataj la rajtoj de minoritatoj, se oni abolas ilin. Se oni perversigas la leĝon tiel, kiel okazis en Selma, tiam ĝi povas okazi." "Kion oni povas fari kontraŭ tio?" "Vi mem povas fari tion", mi diris al ili. "Se vi kapablas defendi vian konstitucion, viajn rajtojn, vian demokratian ordon, protektante la rajtojn de minoritatoj – tiam vi povas venki ĝin."

Ni en Eŭropo plejparte devenas de la juda-krista tradicio. Kaj kredemaj kaj nekredemaj homoj rigardas la dek ordonojn sia civiliza kanono. Mia amiko, la prezidento de la Internacia Aŭŝvico Komitato, Roman Kent, kiu antaŭ kvin jaroj ĉi-loke okaze de la lasta aranĝo faris paroladon, ne povis veni hodiaŭ. Li elpensis dekunuan ordonon, kiu prezentas la spertadon de la ŝoao, de la holokaŭsto, de la horora epoko de malestimo. Ĝi tekstas: **Vi ne estu indiferenta.**

Kaj tion mi volonte dirus al mia filino, tion mi volas diri al miaj genepoj. Al la samaĝuloj de mia filino, de miaj genepoj, kie ajn ili vivas: en Polio, en Israelo, en Ameriko, Eŭropo okcidenta kaj orienta.

Tio ege gravas. Ne estu indiferenta, kiam vi vidas historiajn mensogojn. Ne estu indiferenta, se vi vidas, ke la pasinteco estas mistraktata por aktualaj politikaj celoj. Ne estu indiferenta, se iu minoritato estas diskriminaciata. La esenco de la demokratio konsistas en tio, ke la majoritato regas kaj la minoritatoj devas esti protektataj. Ne estu indiferenta, se iu registaro rompas jam ekzistantajn, kutimajn sociajn kontraktojn. Estu lojala al la ordono. Al la dekunua orddono: Ne estu indiferenta.

Ĉar se vi estos indiferenta, de unu momento al alia iu Aŭŝvico subite falos el la ĉielo, sur vin kaj sur viajn posteulojn.

Elgermanigis: **Wolfgang Guenther**
(w.guenther.esperanto@web.de) laŭ dokumento de
Internationales Auschwitz-Komitee,
Stauffenbergstrasse 13/14, 10785 Berlin
(www.auschwitz.info)

Filmeto pri Esperanto subtitolita en 26 lingvoj

Antaŭ kelkaj monatoj la franca asocio Eŭropo Demokratio Esperanto partoprenis la eŭropan baloton, per listo de kandidatoj.

Por la televida kampanjo ni faris filmeton (en la franca lingvo) por reklami pri nia komuna celo, uzi Esperanton por faciligi rilatojn inter eŭropaj civitanoj.

Ni forigis la finon, kiu petis voĉdoni por nia listo de kandidatoj, tiel ke tiu filmeto estas uzebla ekster baloto, kaj faris subtekstojn en ĉiuj oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio, kaj ankaŭ en Esperanto.


Tiuj 26 filmetoj estas videblaj en <https://www.youtube.com/channel/UCYn83HDC-yBkMhPWb1mAlFw/videos>

Ili estas libere uzeblaj. La germane subtekstigita filmeto havas la adreson <https://www.youtube.com/watch?v=IUxMbJfkdq>

Pierre Dieumegard



Internacia trareta ludposttagmezo



En la fono videblas parto de la nederlanda grupo.
Pere de la projekciilo ili povis vidi nin en Würzburg.

„Kial ĉiam ludi ludojn nur kun homoj en la ĉirkaŭaĵo?“, ni pensis, kaj organizis traretan posttagmezon inter esperantistoj en la urboj Würzburg kaj Utrecht.

La ideo naskiĝis dum JES 2019 kaj komence de marto, post iom da prepariĝo, ni sukcesis realigi ĝin. Partoprenis kvin homoj de la nederlanda grupo kaj kvar homoj el Würzburg.

Por elprovi la koncepton, ni komencis per Esperanto versio de tabuo, en teamoj klarigantaj vortojn tra la reto. La teamoj ĉiam konsistis el Germano kaj Nederlandano, tiel jam dekomence ekestis vigla interŝanĝo inter la du lokaj grupoj.

Ni pli profunde ekkonatiĝis per la ludo “Samopiniuloj”. En tiu ludo oni laŭlegas kategorion kaj ĉiu kunludanto devas trovi kvin vortojn kiuj rilatas al ĝi. La celo estas elpensi plejeble multajn samajn vortojn kiel via samteamano. Surprize multaj homoj ne pensas pri “brosi la dentojn” kiam ili aŭdas “unua afero kiun vi faras matene”...

Post eta paŭzo ni rapidege vojaĝis al Londono por fuĝi de la agentoj de “Scotland Yard”. Tio estis ege amuza, kvankam – malgraŭ kelkaj ege ruzaj movoj – ni estis

kaptita tuj antaŭ la fino. Per skanita plano de la ludo ambaŭ teamoj povis bone sekvi la okazaĵojn. Tamen ne malhelpus se ambaŭ flankoj posedus la ludon.

La lasta ludo estis la kviza ludo Trivial Pursuit. Estis iom malfacile traduki la demandojn spontanee, do venontfoje ni jam tradukos antaŭe.

Entute estis ege bona sperto kaj bona ebleco paroli Esperanton kaj resti en kontakto kun homoj el la tuta mondo.

Se vi volas organizi similan aferon, vi bezonos:

- Komputilon kun Skype aŭ simila programo
- Bonan retkonekton
- sufiĉe bonan mikrofonon
- Laŭparolilojn
- Televidon aŭ projekciilon
- Taŭgajn ludojn
- Grupojn da homoj, serĉu ekzemple en la grupo „Ludoj en Esperanto“ en Telegramo aŭ demandu Esperanto-klubon, kiun vi konas

Ni deziras al vi sukcesan kunludadon kaj amuzon! Se vi havas demandojn aŭ pliajn ideojn pri taŭgaj ludoj, ne hezitu skribi al ni!

Danny, Susanne, Christine kaj Annika

Ehemalige Mitglieder der DEJ berichten über ihre ehrenamtliche Tätigkeit

Nachdem in der letzten Ausgabe ehemalige Vorstandsmitglieder von ihrer Amtszeit erzählt haben, möchten wir nun auch die ehrenamtlichen Mitglieder außerhalb des Vorstands zu Wort kommen lassen, denn ihre Arbeit verdient eine Würdigung und Anerkennung. Auch sie haben wir gefragt, was in früheren Vorständen so passiert ist, und welche wertvollen Tipps man interessierten und engagierten Mitgliedern mitgeben kann. Ich wünsche euch viel Spaß beim Lesen. Eure Cornelia.

Oliver Grimm

[Anbei findest Du noch ein Bild von mir vom IJK 2003 in Lesjöfors, Schweden.

Ich bin der Mensch ganz rechts auf dem Bild. Die anderen beiden sind Oliver Loose und Julia Hell.]

Hallo, ich bin Oliver Grimm und lebe seit sechs Jahren in Landshut, Niederbayern. Ich war in der DEJ aktiv, aber nicht im Vorstand. Aktiven Kontakt hatte ich vor 20 Jahren vor allem zu ein paar DEJ Aktiven im Ruhrgebiet. Ich habe damals ein paar Jahre lang die Treffen in Bochum (mit-)organisiert.

Bezogen auf meine Tätigkeit in der DEJ habe ich die meiste Zeit damit verbracht, meinen Fernschülern mit dem KEK-Kurs Esperanto beizubringen. Ich denke, dass ich insgesamt ca. 50 Fernschüler unterrichtet habe - auch einen späteren DEJ-Vorsitzenden, was mich dann doch recht stolz macht :-)

Am meisten Spaß gemacht haben die Treffen. Was schade ist, ist, dass es außerhalb der großen Städte so wenige Samideanoj gab.

Als ich die Aufgaben angetreten bin, hatte ich die Erwartung, dass alle ehrlich und offen miteinander umgehen. Allerdings waren viele Eitelkeiten dabei. Später habe ich gelernt, dass das einfach oft so ist, wenn Leute sich sehr stark in einem Verein engagieren. Für manche Menschen wird das dann zum Lebensinhalt. Bei Kritik fühlen sich diese Leute manchmal gekränkt. In der ganzen Zeit habe ich gelernt, dass es Spaß macht, sich für eine Sache einzusetzen.

Wenn ich rückblickend etwas anders gemacht hätte, dann wäre es, alles strategisch anzugehen und ganz hart abzuwägen, welche Maßnahmen den größten Aufwand und größten Effekt haben. Und dann vor allem das machen, was den größten Effekt hat.

Heute habe ich kaum Zeit für die Esperanto-Bewegung wegen meiner zwei kleinen Kinder und des Jobs.

Meiner Meinung nach liegt die Esperanto-Bewegung in Deutschland darnieder. Für Außenstehende ist das Thema Esperanto völlig unbekannt. Wie es intern läuft, darüber habe ich keinen Einblick. Ich war schon seit Jahren bei keinem Treffen mehr, leider.

Möglichkeiten, Absolventen von Esperanto-Internet-Kursen in die Esperanto-Bewegung einzubinden, sehe



ich in der Teilnahme an lokalen, regionalen und internationalen Veranstaltungen. Ich denke, da muss man viele niedrigschwellige Angebote schaffen. Bei mir war das erste Treffen 60 km entfernt, dann habe ich Anschluss zu gleichaltrigen S-anoj in der Region gefunden und mit denen viele Sachen zusammen gemacht. Danach war ich beim Dreiländertreffen - sehr genial - und hab dort alle Leute kennengelernt, mit denen ich später viel zu tun hatte.

Das Wichtigste sind meines Erachtens funktionierende lokale Keimzellen; Gruppen von im Kern eins bis drei sehr aktiven Menschen, die schnell viele Dinge organisieren. Diese Leute müsst ihr suchen und finden und fördern mit allem, was geht und das in ganz Deutschland. Das ist wichtiger als alles andere, denke ich. Die richtigen Leute zu finden und zu fördern ist viel wichtiger als Themen oder Material zu besetzen.

Inge Simon

Hallo, mein Name ist Inge Simon, genannt "panjo Inge". In meiner Jugend war ich noch kein Vorstandsmitglied der Esperanto-Jugend; ich habe auch erst mit 29 Jahren angefangen, überhaupt Esperanto zu lernen.

Auf einem Seminar in Oberkirch im Jahre 1999, wo ich einen Test des Deutschen Esperanto-Instituts mitgemacht und bestanden habe, wurde ich von Alois Eder gefragt, ob ich nicht Lust hätte, im Vorstand mitzuarbeiten. Nachdem mich in unserer Gruppe einer vorher geärgert hatte, war das für mich die Gelegenheit, es demjenigen zu zeigen!

Heute bin ich noch im BAVeLo (Baden-Württembergischen Esperanto Verband) aktiv.

Als ich in den Vorstand der DEJ eingetreten bin, war ich 30 Jahre alt und arbeitslos. Ich war dort Mädchen für alles, Esperanto-Jugend, Teilnehmer der Seminare, Adressverwaltung, Seminare organisieren. Inzwischen Zusammenarbeit mit den Ostfranzosen, man krokodilt nicht so viel. Ich habe viel Zeit investiert, aber im Endeffekt kann jeder selbst entscheiden, wie viel Zeit man zu opfern bereit ist.

Am meisten hat mir Spaß gemacht, dass ich bei Jugendtreffen dabei sein konnte. Absurd finde ich es, wenn die Leute meinen, sie können sich an- und wieder abmelden, wie es ihnen gefällt. Wenn jemand in einem Reisebüro etwas bucht, fallen ja auch Kosten an, aber daran denken Espis nicht.

Als ich den Posten im DEJ-Vorstand angetreten bin, hatte ich die Erwartung, dass die anderen es genauso ernst nehmen wie ich, und dass man sich auf die anderen verlassen kann. Man muss aber dauernd hinterher sein, obwohl es bei uns im Bavelo trotzdem sehr gut klappt.

Allerdings habe ich später die Erfahrung gemacht, dass manche sich nur ins Rampenlicht stellen wollen. Bei uns ist das Gott sei Dank nicht so. Man denkt mit. Als ich bei einem Treffen in Ludwigsburg nicht mehr daran gedacht habe, nochmals in den unteren Raum zu schauen, weil ich mit anderen Arbeiten belegt war, dann hat unserer Vorsitzender das bemerkt und ganz einfach aufgeräumt.

Während meiner Amtszeit habe ich gelernt, auch mal "nein" zu sagen. Man muss ab und zu auch mal Diskussionen führen, auch wenn es unbequem ist. Aber nur so kann man gute Arbeit leisten.

Erreicht habe ich in meiner Amtszeit, dass viele Teilnehmer mit den Treffen zufrieden waren (größtes Lob) und immer wieder gern kommen.

Wenn du dich für ein Amt im Vorstand interessierst, brauchst du Weitsicht, du musst mitdenken und vorausdenken können. Und für die Leute da sein, ihnen das Gefühl geben, sie seien die Wichtigsten beim Treffen.

Heute bin ich, wie bereits erwähnt, immer noch beim Bavelo, obwohl ich früher auch gefragt wurde, ob ich bei der GEA mit in den Vorstand einzusteigen mag. Aber das wäre nicht mein Ding.

Die Zeit hat sich gewandelt, die Leute wollen sich nicht mehr in Gruppen treffen, nur ab und zu zum Zusammensein,

und dann große Treffen. Aber es sollten Treffen sein, die sowohl Wissen vermitteln als auch viel Spaß, auf die richtige Kombination kommt es an.

Wenn man Absolventen von Esperanto-Internet-Kursen in die Esperanto-Bewegung einbinden möchte, müssen diese zuerst mal zu der Esperanto-Bewegung dazustoßen. Viele Leute haben über Duolingo gelernt, aber es fehlt der Bezug zur Esperanto-Bewegung.

Wir müssen schauen, wie wir diese Esperanto-Lerner erreichen, und dann entweder zu kleinen, regionalen Treffen einladen, und später zu großen.

Fahrtkostenzuschüsse 2020

11.-18.7. IJK in Someren, Niederlande 80€
18.-26.7. SES in Kroměříž, Tschechien 150€
1.-8.8. UK in Montreal, Kanada 400€

Wir wissen, dass die Planung von Reisen aktuell schwierig ist. Kontaktiere mich gerne jederzeit, falls du schon deine Reise bezahlt hast und das Treffen dann wegen Coronavirus abgesagt wird, wie zum Beispiel das IJE, das sonst auch gefördert worden wäre.

Dein Lars Hansen
(gej.kasko@esperanto.de)

Mein erstes Esperanto-Treffen

„Wo verbringst du denn Silvester?“ Diese Frage stellen Leute ja gerne, wenn es auf das Jahresende zugeht. So leicht zu beantworten war sie für mich in den vergangenen Monaten nicht, denn der Name der Unterkunft, wo das diesjährige JES stattfand, lässt sich beim besten Willen nicht aussprechen, ohne sich die Zunge zu verknoten: Szczeliniec.

Folglich bestand auch eine der Aufgaben während des Interkona Vespero am ersten Abend darin, eine Person zu finden, die dieses Wort aussprechen kann. Vermutlich kommt es nur auf Esperanto-Treffen vor, dass man eher jemanden trifft, der mehr als vier Sprachen spricht (eine andere der Aufgaben), als jemanden, der sagen kann, wo man sich befindet.

Am nächsten Tag nahm ich an einer Exkursion in den Kurort Bad Kudowa teil, wo wir vom Heilwasser kosteten (das ist sicher sehr gesund, denn wie jedes Kind weiß, dürfen gesunde Sachen niemals gut schmecken) und die Schädelkapelle besichtigten. Nachmittags fand ein Musik-Quiz statt, bei der man die Sprache des jeweiligen Liedes raten musste. Auch meine Muttersprache war dabei vertreten, zur



allgemeinen Erheiterung durch den Ballermann-Hit „Hub Hub Hubschraubereinsatz“. Nach dem Abendessen draußen am Lagerfeuer boten Esperantisten aus verschiedenen Ländern im Rahmen der Trinkomanĝa Nokto Spezialitäten aus ihrer Heimat an. Den Abschluss des Abend bildete ein Konzert von JOMO.

Am nächsten Morgen brachen wir zum Szczeliniec auf, dem höchsten Berg des Nationalparks Heuscheuer-Gebirge (und Namensgeber unserer Unterkunft). Dabei zeigte sich, dass er nicht nur für die Zunge eine Herausforderung ist, denn es führt nur ein schmaler, steiler Fußweg nach oben. Auf dem Weg erzählte uns der Wanderführer, wie die Felsformationen entstanden sind: Vor langer Zeit entführte der Geist des Berges eine wunderschöne Prinzessin. Von weit her kamen die Soldaten mit ihren Kamelen und Elefanten, um sie zu befreien. Doch natürlich hatte der Geist etwas dagegen und so ließ er Soldaten, Tiere und Prinzessin zu Stein erstarren, sodass man sie heute noch auf und um den Szczeliniec sehen kann. Abends konnte man in der Silenta Diskejo tanzen. Dabei bekommt man Kopfhörer, auf denen man sich einen von drei Musikkkanälen aussuchen kann. Je nachdem, welchen Kanal man eingeschaltet hat, leuchten die Kopfhörer in einer anderen Farbe, sodass man sehen kann, wer von den anderen Tänzern dieselbe Musik hört. Lustiger, als selbst zu tanzen, ist es allerdings, den anderen dabei zuzusehen (und denen zuzuhören, die mitsingen).

Am Montag in aller Herrgottsfrühe (okay, um 9:15 Uhr) ging es los zu einer Exkursion durch den Nationalpark. Bei herrlichem Winterwetter wanderten wir zu den Felsenlabyrinthen Błędne Skały. Am Abend fand ein



Kneipenquiz zum Thema Alkohol statt. Dabei lernte ich viele nützliche Dinge, zum Beispiel wie viele Bläschen in einer Sektflasche sind (100 Millionen). Vermutlich gibt es kaum einen besseren Gesprächsbeginn bei einem Sektempfang.

Darauf folgte Silvester, ein ziemlich ruhiger Tag ohne großes offizielles Programm, an dem ich mit neuen Freunden Brettspiele spielte und kurz vor Einbruch der Dunkelheit einen Ausflug zum Aussichtspunkt Fort Karola unternahm. Der abendliche Silvesterball dauerte bis 5 Uhr morgens (und ich war beim letzten Rausschmeißer noch auf der Tanzfläche – es muss also eine gute Party gewesen sein).

Dementsprechend gemütlich begann der 1. Januar. Nach dem „frühen“ Mittagessen (bis 14 Uhr) wurde im Kinejo „The Room“ gezeigt, nach Ansicht vieler Kritiker der schlechteste Film aller Zeiten. Aus eigener Erfahrung kann ich berichten, dass man zumindest keine wesentlichen Teile der Handlung verpasst, wenn man während der Vorführung für eine halbe Stunde einschläft. Das Abendprogramm bestand aus einem ruhigen Konzert von Tim Gallego.

Auch für Donnerstag hatte ich mir nicht viel vorgenommen. Nach einem letzten Schneespaziergang und einigen Brettspielen begann der der Internacia Vespero. Dieser wurde vor allem von der Musikuma Rondo bestritten, die für ihre Auftritte die ganze Woche über geprobt hatten. Außerdem stellten die VIpoj „Malfruiĝo“ vor, ihren neuen Song, extra für das aktuelle JES geschrieben.

Dann war die Woche auch schon vorbei. Für mich war es das erste Esperanto-Treffen, das ich besucht habe, aber ich hoffe sehr, dass es nicht das letzte war. Ich habe viele nette Leute aus verschiedenen Ländern kennengelernt, viele interessante Gespräche geführt und ganz allgemein super viel Spaß gehabt. Und – zumindest bilde ich mir das ein – ich kann jetzt das Wort „Szczeliniec“ aussprechen :-)

Susanne Sauer

KEKSO en Schwerte estis nuligita!

Tre aktuala temo (meze de marto 2020), kiun vi ne povas eviti, ĉar ĝi ĉie aperas en la novaĵoj kaj kiu influas nian ĉiutagan vivon, estas la kronviruso. Unue homoj aĉetis grandajn kvantojn de necesejpapero kaj desinfektaĵo, poste grandaj eventoj estis nuligitaj kaj nun eĉ lernejoj fermiĝas kaj ankaŭ etaj renkontiĝoj estas tro granda risko por nia sano.



Jahresbericht 2019

Lieber Mitglieder, es ist wieder soweit, wir berichten aus dem Vorstand, was im Jahr 2019 passiert ist. Diejenigen von euch, die bei der Mitgliederversammlung beim JES waren, werden einiges wiedererkennen. Ich möchte an dieser Stelle ganz herzlich meinen Vorstandskollegen danken und natürlich allen fleißigen Helfern, die uns bei der Vereins- und Öffentlichkeitsarbeit unterstützt haben.

Mitgliederverwaltung

Das Mitgliederverwaltungssystem des DEB wird gut gepflegt, nur leider ist noch kein reibungsloser Übergang von DEJ- zu DEB-Mitgliedern nach Erreichen der Altersgrenze geregelt. Wir bitten euch deshalb darum, uns dabei etwas zu unterstützen und wenn ihr 28 werdet daran zu denken, dass eure DEJ-Mitgliedschaft erlischt und ihr jetzt die DEB-Tarife zahlen dürft. Damit gehört ihr nicht automatisch zum alten Eisen, sondern könnt euch neuen Herausforderungen stellen und Esperanto in Deutschland unterstützen.

KEKSOs

Im Jahr 2019 wurden wie in der Vergangenheit zwei KEKSOs veranstaltet. Das 25. KEKSO fand im Mai gleichzeitig mit dem GEK in Neumünster unter der Leitung von Janett Keilholz und Paul Würtz statt; das 26. KEKSO wurde gemeinsam mit dem ĈAR der PEJ in Görlitz/Zgorzelec veranstaltet. Beide Veranstaltungen verliefen ausgelassen und zur Zufriedenheit aller Teilnehmer. Jonas Marx erstellte ein neues Logo für das KEKSO, das ab 2020 genutzt wird.

Internet und Kommunikation

Paul Würtz, Lars Hansen und Jonas Marx haben viel erreicht. Der Instagram-Account @esperantojugend ist gut angelaufen (mit Posts zum Thema „Warum sollte man Mitglied werden?“, Terminen, Bildern und Wissenswertem), die ersten drei Newsletter wurden erstellt.

Einige der Formulare auf der Website wurden überarbeitet, Kune-Artikel digitalisiert und an einer eigenen modernen Unterseite für die DEJ gearbeitet. Zum Ende des Jahres stieg Tim Gallego in das Team mit ein.

Öffentlichkeitsarbeit

Michaela Stegmaier und Paul Würtz waren sowohl beim Kirchentag in Dortmund (mit Unterstützung von Stella Diestel) als auch erneut bei der Expolingua im November in Berlin vertreten, um den jeweiligen Esperanto-Stand tatkräftig zu unterstützen. Wirklich viele Menschen sind interessiert oder freuen sich, endlich mal wieder was von Esperanto zu hören. Wir können euch auch Material für Esperanto-Informationsstände in eurer Region zusenden.

La IJF en Italio jam informis partoprenantojn, ke ili ne venu (el kaj al Italio ja ĉiukaze ne eblas vojaĝi) kaj ankaŭ la organizantoj de KEKSO devis decidi kaj nuligis la eventon. Sekvas kelkaj pensoj de ne-plu-partoprenantoj:

„Ich hatte mich darauf gefreut meine Esperanto-Kenntnisse wiederaufzufrischen. Ich kann zwar schon ein bisschen was, aber die Motivation mit anderen Anfängern zu lernen ist dann natürlich größer als allein. Ich habe die Zeit nun stattdessen genutzt, um ein bisschen zu lesen und insgesamt ein ruhiges Wochenende verbracht. Bei der aktuellen Lage hat man ja nicht so viele andere Möglichkeiten. Ich bin nicht direkt wegen meiner eigenen Gesundheit besorgt, aber ich hoffe, dass nicht so viele Kranke oder alte Menschen angesteckt werden.

Es ist natürlich sehr schade, dass so viele kulturelle Veranstaltungen aktuell ausfallen müssen, aber viel kann ja zum Glück verschoben oder nachgeholt werden.

Und wenn sich die Lage wieder normalisiert hat, kann bestimmt auch wieder ein KEKSO stattfinden.“ - Lea Dückerhoff

„Mi estas Jani and mi estis parto de la organiza teamo de KEKSO. Kiam mi venis hejme vespere antaŭ la komenca tago de KEKSO, mi legis la novaĵojn pri kreskantaj nombroj de homoj kiuj malsaniĝis pro kronviruso. Mi komprenis ke mi devis rapide reagi kaj post demandi pri opinioj en la telegramgrupo de GEJ decidis nuligi la renkontiĝon lastminute. KEKSO havas malmulte da partoprenant(in)ojn - tamen mi pensas ke estis la ĝusta decido. La sekureco kaj sano de la homoj ĉirkaŭ ni gravas pli ol nia renkontiĝo. Sed mi ja bedaŭras la situacion ĉar mi jam multe antaŭĝojis revidi amikojn, ekkoni novajn homojn, lerni kaj instrueti, kuiri kaj manĝi kune, promeni, ludi kaj babili! Anstataŭ tiu, mi nun uzis la semajnfinojn por ripozi kaj retumi. Mi esperas ke la venonta KEKSO okazos sen neatenditaj problemoj kaj ni povas kune ĝui la tempon.“ - Janett Keilholz

„Dum la lastaj tagoj la kronviruso, kiu ĝis nun ŝajnis tiom for, finfine ekhavis efikon sur mia propra vivo. Koncerto estis nuligita kaj nun ankaŭ la KEKSO. Mi tre bedaŭras tion, ĉar la renkontiĝeto estintus mia unua renkontiĝo el vidpunkte de respondeculo. Kvankam mi surpris nur malmultajn, en la granda skemo malpli gravajn taskojn, mi tamen maltrafis bonan eblecon kolekti spertojn en tiu kampo. Mi ankaŭ antaŭĝojis la revidon de malnovaj kaj ekkoniĝon de novaj amikoj, la komunan ludadon, kuiradon, kaj ĝuiĝadon ĝenerale. Estas dezirinda, ke la decido estis favora al la pli granda bono. Mi mem ankoraŭ ne estas tro maltrankviliĝita pro la komencanta epidemio, tamen volas obei laŭeble plej bone la rekomendojn de la registaro kaj sciencistaro. Pro tio mi uzas la ĵus gajnintan tempon por plenumi endomajn taskojn: Mi preparas mian loĝejon por la alveno de nova kunloĝantino, ordigas universitatajn aferojn kaj multe legas librojn.“ - Jan Raring

„Malgraŭ mia vundita piedo mi trovis eblecon partopreni en KEKSO, ĉar mia fratino Janette ja posedas aŭton kaj povintus kunporti min. Ni kaŝe aliĝis por surprizi la aliajn kaj eĉ konvinkis alian hercberganon veturi kun ni. Nun mi uzas mian liberan semajnfinojn por aliaj Esperanto-celoj kaj tamen faros etan ekskurson kun mia fratino.“ - Michaela Stegmaier

Zeitschrift -kune-

Die kune ist 2019 sechsmal erschienen, also lückenlos! Es wurden 26 Seiten von möglichen 36 Seiten kune gefüllt. Die Beiträge wurden von Michaela Stegmaier gesammelt und an die Redaktion der EA weitergeleitet. Die PDF-Dateien von Ausgaben der vergangenen Jahre sind nun auf der Website des DEB zu finden. Vielen Dank an alle Mitwirkenden!

Regionales, Unterricht und Neulingsbetreuung

Annika Förster lud wieder mehrmals zu Spieleabenden nach Würzburg ein, Michaela Stegmaier organisierte einige Esperanto-Nachmittage für interessierte Jugendliche in der Esperanto-Stadt Herzberg am Harz.

An Esperanto-Kursen im Netz wurde von Paul Würtz und Annika Förster weitergearbeitet.

Aus dem Vorstandswochenende im Juni ging ein Ortsgruppenleitfaden hervor, der allen Mitgliedern mit dem Newsletter zugänglich gemacht wurde.

Finanzen

Auch im Jahr 2019 hatte unser Schatzmeister Lars Hansen viel zu tun. Die Endabrechnung des Genra-egaleco-Projektes war eine Sache, die Erstellung und Einhaltung des Haushaltsplans eine andere. Außerdem hat die DEJ einen neuen Angestellten, der für TEJO arbeitet. Genauere Infos findet ihr im Kassenbericht. Bitte beantragt fleißig Fahrtkostenerstattungen, wenn ihr auf subventionierte Treffen fahrt, nicht abgerufene Subventionen müssen zurückgezahlt werden. Welche Treffen gefördert werden, findet ihr in der aktuellen Ausgabe der kune und auf allen weiteren Informationskanälen der DEJ.

Internationale Beziehungen

Als nationale Untergliederung von TEJO war die Deutsche Esperanto-Jugend auch 2019 weiterhin mit zwei Mitgliedern im Komitee („komitato“) der weltweiten Esperanto-Jugendorganisation vertreten. Die Aufgabe dieser Vertretung haben Klára Ertl und Michael Vrazitulis übernommen. Durch Online-Abstimmungen, aber auch durch die beiden abgehaltenen Komiteesitzungen im Juli (während es IJK in der Slowakei, wo der neue TEJO-Vorstand gewählt wurde) bzw. im Dezember (während des JES in Polen) konnten die Interessen der Deutschen Esperanto-Jugend auf internationaler Ebene vertreten werden. Dabei wurden wieder die Ausgestaltung des Haushalts („buĝeto“) sowie eine Umsetzungsstrategie für geplante Projekte („realigplano“) diskutiert und beschlossen. Die Vertreter*innen der DEJ haben bei der Einigung auf eine Mitgliederzählweise – in Einklang mit der Mehrheit der internationalen Komiteemitglieder – gegen die Abschaffung der kostenfreien Mitgliederkategorie „Junaj Amikoj de Esperanto“ gestimmt. Auch im Jahr 2020 wollen und werden

wir weiterhin in den Entscheidungsstrukturen unserer weltweiten Mutterorganisation vertreten sein.

Konstanze Schönfeld konnte bis Ende August 2019 für guten Kontakt zwischen DEJ und TEJO sorgen. Es wird weiterhin mit Interessenten zusammengearbeitet um die DEJ in TEJO-Projekte einzubinden. Bei einer Reihe internationaler Konferenzen konnte sie sich mit jungen Aktivisten aus anderen Organisationen austauschen und über die Arbeit der DEJ berichten. Unter anderem hat sie an dem UN Sustainable Development Goals Festival in Bonn, an der UNITED-Konferenz in Durrës und an dem ersten Model European Federation in Straßburg und Ortenberg teilgenommen und mit vielen jungen Aktivisten aus Deutschland und Nachbarschaft Kontakte knüpfen können.

Junulara E-Semajno (JES) - das Silvestertreffen der Deutschen Esperanto-Jugend

David Mamsch berichtet, dass er hauptsächlich damit beschäftigt war, das aktuelle Treffen JES zu organisieren. Er hat unter anderem die Kommunikation zwischen der Deutschen Esperanto-Jugend (DEJ) und der Polnischen Esperanto-Jugend (PEJ) koordiniert. Eine gemeinsame Vorstandssitzung mit PEJ beim Arkones zur Besprechung gemeinsamer Aktionen und des JES wurde durchgeführt.

Am Ende des Jahres schalteten sich Konstanze, Michaela, Lars, David und Annika zusammen, um einen geeigneten Veranstaltungsort für das JES 2020 zu suchen.

Zusammenarbeit mit dem DEB

Kontakte zwischen dem DEB und der DEJ wurden auf finanzieller Ebene zwischen Lars Hansen und Matthias Hecking sowie Andreas Diemel gepflegt. Konstanze Schönfeld konnte auf dem UK in Lahti viele Mitglieder des DEB kennenlernen oder wiedertreffen. Michaela Stegmaier vertrat die DEJ wie im Vorjahr auf der Verbandsratssitzung in Herzberg am Harz. Wir konnten besonders in 2019 davon profitieren, dass Franz Kruse den Internetauftritt „Esperanto in Deutschland“ aktualisiert und verbessert hat. Dabei entstand eine interne Struktur auf der Website, auf der wichtige Dateien abgelegt werden können. Die Zusammenarbeit mit dem Deutschen Esperanto-Bund verläuft reibungslos bis freundschaftlich. Natürlich gibt es einige Themen, denen erst Nachdruck verliehen werden muss oder leidige Diskussionen, die immer wieder aufkommen, aber es wird immer eine Lösung gefunden, die beide Organisationen vertreten können. Auf Veranstaltungen wie dem DEK und der Expolingua sind DEJ-Mitglieder immer gerngesehene Gäste bzw. Unterstützer. Nur über persönliche Kontakte kann eine gute Zusammenarbeit aufrecht erhalten werden.

Euer Vorstand im Jahr 2019:
Lars, Michaela, David, Konstanze

Svisa Esperanto-Etfilmkonkurso 2020

„Unueco en diverseco“ sub la aŭspicio de Svisa Esperanto-Societo



Aliĝu nun kaj submetu vian filmon:
<http://esperanto.ch/etfilmkonkurso>

Schweizer Esperanto-Kurzfilmwettbewerb 2020 „Einheit in Vielfalt“ unter der Schirmherrschaft der Schweizer Esperanto-Gesellschaft. Melde dich jetzt an und reiche deinen Film ein: <http://esperanto.ch/kurzfilmwettbewerb>

En la konkurso rajtas partopreni filmistoj el la tuta mondo. La filmoj devas esti parolataj en Esperanto aŭ havi subtitojn en Esperanto.

Internacia Literatura Esperanta Konkurso

“Hristo Gorov-Hrima” – 2020



Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por rakonto kaj eseo.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton kun supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman - 12 punktaj

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn. Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2020 rete al: e-mail: modest@abv.bg aŭ per la poŝto al la adreso: Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, “Vrabnica” 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.

Premio Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento



Okaze de la 40-jara ekzisto de MONATO, kaj por memori sian forpasintan ĉefredaktoron Paul Gubbins, la revuo starigis la Premion Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento. Ĉiujare, kaj tiel longe ke restos mono en la fonduso kreita pro tiu ĉi celo, estos aljuĝata ĉefpremio de 250 eŭroj, dua kaj tria premio de 100 eŭroj kaj sep senpagaj abonoj de MONATO.

Regularo

1. Povas partopreni ĉiu persono, kiu bone regas Esperanton kaj kiu ne verkis por MONATO en la lastaj kvin jaroj.
 2. Por partopreni la kandidatoj sendu tekston de minimume 500 kaj maksimume 2500 vortoj al nova_talento@monato.be. Prefere la teksto simple troviĝu en la retmesaĝo, ne en aparta aldonaĵo.
 3. La temoj inter kiuj la kandidatoj povas elekti estas:
 - * La politiko, vivo, turismo aŭ historio de sia propra lando aŭ regiono; * Ekonomio; * Komputado; * Scienco; * Medio kaj ekologio; * Lingvo
 Atentu, ke do Esperanto-movado ne estas inter la temoj. MONATO estas revuo en Esperanto, ne pri Esperanto.
 4. La kontribuoj estu originale verkitaj por MONATO. Do ne estos akceptitaj tradukoj, nek artikoloj, kiuj jam aperis aliloke.
 5. La aldono de fotoj al artikoloj estas rekomendata. Tiuj fotoj devas esti faritaj de la aŭtoro mem, aŭ almenaŭ li posedu la permeson publikigi ilin en MONATO. Se en la foto aperas personoj, li havu la permeson de tiuj personoj, por uzi la foton kune kun la artikolo, aŭ eventuale, permeson de la gepatroj, se en la foto aperas infanoj. La fotoj havu la formon .JPG aŭ .TIFF.
 6. La uzon de pseŭdonimo MONATO permesas nur tre escepte, ekzemple por protekti personojn en totalismaj ŝtatoj.
 7. Partoprenanto donas al la eldonanto la ekskluzivan eldonrajton de la tekstoj, kiujn ŝi/li havigas al MONATO por tiu ĉi konkurso. Tiuj rajtoj validas por la presita kaj la ciferecaj eldonoj de la revuo.
 8. La redaktoroj decidis, surbaze de la lingva kaj ĵurnalisma talentoj de la aŭtoroj, kiuj artikoloj partoprenantaj en la konkurso aperis unu el la ĉefpremioj rajtas en la venonta jaro denove partopreni. Se ne estas sufiĉe da valoraj kontribuoj, povas esti malpli ol dek premioj.
 9. Ne ekzistas limdato. Ĉiumonate MONATO publikigos la akceptitajn kontribuojn kaj poste la ĵurio elektos la 10 plej bonajn, kiuj ricevos la premiojn. Partoprenanto povas sendi plurajn kontribuojn, sed povas gajni nur unu premion. Kiu ne gajnis unu el la ĉefpremioj rajtas en la venonta jaro denove partopreni. Se ne estas sufiĉe da valoraj kontribuoj, povas esti malpli ol dek premioj.
- Antaŭ ol ekverki, indas demandi ĉe nova_talento@monato.be, ĉu via temo taŭgas por la konkurso. Tie vi povas ricevi ankaŭ ĉiujn pliajn informojn. Kiu ne konas MONATOn povas de tie ĉi elŝuti plurajn kompletajn numerojn: <https://www.monato.be/2018/index.php>

